

Usona Esperantisto № 2023:2 (mar-apr)

Anoncoj

Usona Persone atingas dek epizodojn; Estraraj kandidatoj por 2023; Stipendioj haveblas por partopreni kongresojn; Filmisto serĉata; KER-ekzamenoj en Junio; Studsemajno por instruistoj en Pollando; Infanoj Ĉirkaŭ Afriko serĉas provlegantojn; Korespondi deziras

De la estraro

Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Perdigota

senintenca esperantaĵo • Brandon SOWERS
Vino tiel ebriga, ke oni perdas la botelon antaŭ ol malpleniĝi ĝin.

Alfabeta defio

loke • Arlyn KERR
Jen defio de la loka grupo en Seatlo, eble taŭga por via grupo.

Videoluda helpo serĉata

leterkesto • Mark HAMME
Neniam ludinte rolludon, mi estas perdita. Ĉu iu povus sendi al mi informlibreton?

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS
Expense report from the CO for February and March.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK
La dudek-sesa en serio de Timothy BORONCZYK.

A brief language lesson about *ambaŭ*

language corner • Lee MILLER
The word *ambaŭ* functions as a pronoun and an adjective.

Debutas defio domena

traduku! • Hoss FIROOZNIA
Ĉi-numere ni prezentas novan tradukdefion por vi el lastatempa novelo *La domenisto* de Paulo Sérgio VIANA.

La ekesto de artefaritaj verkistoj

scienco • Timothy BORONCZYK
Artefaritaj intelektoj ricevas atenton lastatempe pro ties mirindaj tekstaj verkoj.

Mikronoveloj

Novaj centvortaĵoj.



Anoncoj

Usona Persone atingas dek epizodojn

En la somero lanĉiĝis *Usona Persone*, podkasto iniciatita de tri usonaj esperantistoj, inspirita je la intereso pri kultura agado ĉe la Landa Kongreso de Esperanto-USA en Montrealo.



La podkasto jam fiere kalkulas je dek epizodoj, pri tre diversaj temoj. Ĝi celas informi kaj interesi pri kuriozaj flankoj de Esperant(uj)o, kaj kapti la atenton de spertaj esperantistoj same kiel utili al progresantoj kaj lernantoj. Ĝi ankaŭ aŭdebligas usonajn voĉojn en la internacia movado.

La epizodoj ĝis nun temas pri, inter aliaj:

- La teatraĵo *1910*, kiu debutis en Montrealo pasintjare
- La *Baza Legolisto* de William AULD
- La reformoj kiujn Zamenhof proponis en 1894
- kaj – la plej aŭskultata – “Ĉu Esperanto estas Sekto?!”

Ĉu vi ne jam aŭskultis? Abonu ĝin nun! Vi povas trovi nin ĉe **Jutubo** <<https://www.youtube.com/@usonepersone>> aŭ aboni ĉe ajna podkast-ludilo. Pli da informo troveblas ĉe **nia retpaĝo ĉe anchor.fm** <<https://anchor.fm/usonepersone/>>.

— Brandon SOWERS

Kandidatoj por 2023

Jen la listo de la kandidatoj por la ĉi-jara balotado, aprobita unuanime de la Kandidatiga Komitato:



Ofico	Nomo
Prezidanto	Brandon SOWERS
Vicprezidanto	Hoss FIROOZNIA
Direktoro	Enrique Haro MÁRQUEZ
Direktoro	Logan HALL
Direktoro	Quintyn BOBB
Direktoro	Charles GERMANY

Mi ankaŭ rimarkigu, ke Brandon SOWERS estis rekte nomumita de la membraro: li ricevis la subtenon de 9 membroj de Esperanto-USA, kiuj sendis al mi po mesaĝon subtenantan lian kandidatigon (kaj laŭ la regularo, nur 5 tiaj subtenoj estas bezonataj por rekte nomumi iun).

Mi kore dankas al Rachel HELPS, Elle BECK, Brandon SOWERS, Aaron COX, kaj Kartero WILLIAMS pro ties laboro en la Nomuma Komitato.

— Jorge Rafael NOGUERAS, Estro de la Kandidatiga Komitato de Esperanto-USA por 2023 <rafaeln@alum.mit.edu>

Stipendioj por kongresoj

Esperanto-USA volas doni stipendiojn kaj helpon por partopreni kongresojn ĉi-jare. Ĉu vi volas partopreni kongreson, sed ne certas, ĉu vi povos – aŭ pro monaj kialoj aŭ pro la manko de ia alia helpo? Kontaktu nin per la subaj formularoj:



- **Usona Landa Kongreso**
<<https://forms.gle/bqwX2bxt17rwqPUY7>> (LK – Raleigh, Norda Karolino)
- **Universala Kongreso** <<https://forms.gle/mRomoovx2ecpPPmeA>> (UK – Torino, Italujo)
- **Internacia Junulara Kongreso**
<<https://forms.gle/sfUiHy6MB6WDXzh29>> (IJK – Lignano Sabbiadoro, Italujo)
- **Tut-Amerika Kongreso de Esperanto**
<<https://forms.gle/a7jqhU3gqXdaNqvn7>> (TAKE – Fortalezo-CE, Brazilo)

Filmisto serĉata

Esperanto-USA serĉas filmiston por registri kaj redakti filmojn de sesioj ĉe la ĉi-somera LK en Raleigh, Norda Karolino. La organizaĵo pagos la kongreskotizon, vojaĝ-koston, kaj pluan stipendion por la laboro. La filmisto devos uzi siajn proprajn kameraon kaj ekipaĵojn. Por pli da informo, bonvolu sendi mesaĝon al Charlotte BURTON ĉe <liquidfireangel@gmail.com> aŭ rekte aŭ per retpoŝto al la estraro ĉe <eusa-board-of-directors@groups.io>.



Esperanto-USA is looking for a camera person to record and edit footage of sessions at this summer's National Congress of Esperanto in Raleigh, NC. The organization will pay congress costs, travel costs, and an additional stipend for the work. The camera person will be required to use their own camera and equipment. For more information, contact Charlotte Burton directly at <liquidfireangel@gmail.com> or via an email to the Esperanto-USA Board of Directors at <eusa-board-of-directors@groups.io>.

— Charlotte BURTON <liquidfireangel@gmail.com>

KER-ekzamenoj en Junio

La KER-Ekzamena Centro de UEA informas, ke en Junio denove okazos retaj KER-ekzamenoj en tri niveloj:

- la 3-an de Junio je nivelo C1;
- la 10-an de Junio je nivelo B2;
- la 17-an de Junio je nivelo B1.

Dum la kongreso en Torino eblos trapasi ekzamenojn ĉeeste je ĉiuj kvar niveloj B1, B2, C1 kaj C2. La plej alta nivelo povos okazi kondiĉe ke aliĝos minimume 15 kandidatoj.



Informojn pri la ekzamenoj vi povas legi en la ekzamenpaĝo <<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk>>.

Eblas partopreni ankaŭ preparsesiojn, kie oni klarigos la teknikajn kondiĉojn, la strukturon kaj taskotipojn de la ekzamenoj kaj konsilos ankaŭ pri la elekto de la ĝusta nivelo kaj preparteknikoj.

La unua Zoom-preparesio okazos jam fine de Februaro. Vidu ankaŭ la aliajn en **la paĝo de la preparsesioj** <<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/preparkurso>>.

Atentu, por partopreni la sesion, necesas registriĝi.

Pliajn informojn petu ĉe <ker-ekzamenoj@edukado.net>.

Infan-Adoleskanta Kongreseto

Lige kun la 108-a UK en Torino okazos samtempe, de la 29-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto 2023, ankaŭ la 51-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) meze de la Parko La Mandria, apud Torino, Piemonto, Italujo. Jen la **kongresa retejo** <<https://iik.uea.org/2023/>>.



La temo de la kongreseto estas “Sporto kaj Naturo”.

La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto en natura medio. Okazos ludoj kaj sporto, natursciencaj atelieroj kaj biciklado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vesperaj ludoj kaj interesaj vesperaj agadoj atendas la infanojn kaj adoleskantojn.

IIK bonvenigas partoprenantojn de diversaj aĝogrupoj, kiuj parolas Esperanton (minimume – scipovas baze kaj klare esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto):

- infanoj kaj adoleskantoj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj
- adoleskantoj ekde 17 jaroj kaj fluparolantaj povas fariĝi helpantoj
- infanoj ĝis sep jaroj kutime bezonas gepatron/prizorganton/vartiston dum IIK.

En la retejo vi trovos pliajn informojn kaj la aliĝilon, kie ĉiu infano povas indiki siajn ideojn por la programkontribuoj, kio certe eĉ pli riĉigos la eventon. Pri ajnaj demandoj bv. skribi al <infana.kongreseto@gmail.com>.

IHK ankaŭ invitas vin subteni la partoprenon de infanoj/adoleskantoj el nepagipovaj landoj en la IHK per **mona donaco al la kongreseto** <<https://uea.org/alighoj/donacoj>> UEA-kontoj: **Adoptaj Gepatroj** <<https://uea.org/alighoj/donacoj/gepatroj>> kaj **Infana kongreseto** <<https://uea.org/alighoj/donacoj/iik>>.

Instruista studsemajno

Ĉu vi interesiĝas pri instruado de Esperanto? Ĉu al vi plaĉas vojaĝi kaj interagi kun esperantistoj en aliaj landoj? Jen la perfekta kurso por vi! Ĝi ofertas al vi profesinivelan trejnadon pri instruado de Esperanto, kun aldona studado de diversaj temoj rilate al nia lingvo, kulturo, literaturo kaj historio. Vi povus mem fariĝi instruisto de Esperanto ĉe NASK, ĉe aliaj ĉeestaj kursoj, aŭ en la reto, ekzemple por la Londona Klubo. Esperantujo bezonas vin!



Ununura intensiva studsemajno surloke en Pollando okazos de la 9-a – 15-a de Septembro, 2023. Ĉiuj aliaj prelegoj, lecionoj, individua laboro kaj kunlaboro okazos rete dum la sekva jaro. Sukcesintoj ricevos diplomon.

Pliaj informoj haveblas ĉe Edukado.net

<<https://edukado.net/novajhoj?id=888>>. En tiu detala anonco troviĝas retadresoj de la organizantoj,

se vi volas komunikiĝi rekte kun ili. Ankaŭ mi pretas respondi viajn demandojn; mi estas en kontakto kun ili kaj volonte komunikiĝos kun ili viaparte se necesas.

— Ruth “Margo” KEVESS-COEN <ruth3209@gmail.com>

Provlegantoj serĉataj

La organizo Infanoj Ĉirkaŭ Afriko urĝe serĉas volontulojn por helpi provlegi gvidlibron pri instruado de Esperanto en Afriko. La libron verkis Latifou GBADAMASSI, kaj ĝi estas jam provlegita unufoje de Rob MOERBEEK de ILEI.

Ĝi tamen ankoraŭ bezonas plian provlegadon antaŭ la ĉi-jara UK kaj ILEI-kongreso en Italujo.



La 181-paĝa verko prezentas kaj raporton pri Esperanto-agadoj en Afriko, kaj praktikan helpon por Esperanto-instruistoj. Se vi volus helpi en la provlegado, bonvolu kontakti sinjoron Latifou GBADAMASSI ĉe <infanojcxirkauxafriko@gmail.com>.

Korespondi deziras

Mi estas esperantisto en Dakaro, Senegalo. Estus por mi granda plezuro ekrilati kun usonaj esperantistoj. Kontaktu al **Kossi Woudji**, <swoudji55@yahoo.fr>, **Tel/Wasapo: 00221 77588-27 52.**



De la estraro

Board Meeting, March 11th, 2023

Ĉeestas: Filipo DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Margo KEVESS-COHEN, Hoss FIROOZNIA, Fred MEYER, Jane SHEVSTOV, Vilêjo HARRIS (sen voĉdonrajtoj)

Phil opens the meeting and declares a quorum. The agenda has been sent out, and no changes are requested. The minutes of the previous minutes have been posted and approved.

Standing Reports

Central Office

The 12 atestiloj have been received and sent out to all who succeeded in the KER-ekzamenoj. Gary Bisaga has shared with the CO the LK calendar, and the LK registration page is now live. The cost to send out the diplomas is reported as being \$4.15 per diploma, for a total of \$56.02.

Treasurer

The treasurer's reports have been sent out to the board in advance of the meeting. Nothing to add to those reports. The president reminds us that it is difficult to accurately analyze our budget month to month, as income does not flow in evenly each month.

President

Hoss has been working on collecting and formalizing a document for board procedures. This will be discussed with Old Business. The grant request channel in Slack contains questions about opinions regarding the use of the Goldman Fund to support members in three specific ways. With four months left in Phil's tenure as president, he invites comments after this meeting regarding what our most urgent needs are for the board during his remaining months in office. Brandon Sowers is our sole candidate for president, which will be published via Usona Esperantisto with the next issue. Discussion of the details of elections per bylaws arises and is briefly clarified, with further discussion deferred until a later time. Brandon is planning to attend some Zoom meetings in which he will clarify his goals as likely incumbent president. As the board meetings have been taking place under Phil's personal Zoom account, he requests that a budget line item be created for technological expenses, such as a Zoom account and perhaps a videographer to record LK sessions. Fred Meyer states that the regional coordinators are using his own personal Zoom account for their meetings. The board generally expresses agreement with the addition of a technology line item to the budget, and the discussion moves to Slack. Jane recommends that fundraising become a discussion on Slack. Charlotte suggests that the draft budget for next year could include a line item for

technological expenses, and Margo suggests that it could also include a line item for travel expenses, such as for sending board members or students to conferences. Phil laments the lack of sustained membership and donation campaigns.

Old Business

How we do business

This is clarified to cover both the board procedures in general and also the procedures and expectations for official meetings of Esperanto-USA at LK-j. Hoss has created a document and clarifies that the board handbook contains the general introductory items, but we had previously had a Regularo that explains the "nuts and bolts" of how motions, etc. are to take place. This can allow the board handbook to show potential board members the responsibilities and the Regularo to show procedures for the more detailed items. Both documents can be made available to members on the website, but first the Regularo needs to be updated to reflect current procedures, as some have changed. A separate document, though, would need to be an item explaining how to run the formal meetings at the LK. Phil has updated this document. It is also raised that a separate document could be made explaining to members the rules that impact them at a Kongreso.

The board agrees on a date and time for the next meeting.

Board Meeting, April 8th, 2023

Ĉeestas: Filipo DORCAS, Alekso MILLER, David BECK, Charlotte BURTON, Fred MEYER, Ruth (Margo) KEVESS-COHEN, Jane SHEVSTOV, Hoss FIROOZNIA; sen voĉdonrajtoj: Vilêjo HARRIS, Brandon SOWERS, Kuo BOBB

The meeting is called to order. The president clarifies that the candidates to the board have been invited, in order to help them understand and become familiar with board processes. A quorum is declared. The minutes of the last meeting are approved automatically per board procedure. Farendaj Agadoj are read out, and each is confirmed as completed. As there is only one topic of old business and no new business, Phil recommends we add a topic of the LKK to New Business. David requests that we add to the agenda a topic Ruth has proposed in Slack, concerning paying for board participation in LK.

Standing Reports

CO

Nothing to report. Phil asks about the ballot timeline, and Bill clarifies that, per the bylaws, ballots must be sent out 60 days prior to the Congress, and that is when he intends to have them sent out - both digitally and on paper. He will

hold online ballots open until 24 hours before the Congress, including sending ballots to anyone who becomes a member within a 60 day period. Bill is uncertain whether he needs to bring paper ballots to the Congress, or if closing online ballots the day before LK would be sufficient. Phil reads the bylaws as saying that ballots must be in the hands of the director by the close of the first day of the Congress (which would be Saturday), or such other day of the Congress as the board determines. Alex clarifies that voting indeed must be available to new members during the Congress then, and Phil requests that Bill therefore bring paper ballots to the Congress, as the online system has certain requirements in place for security reasons. Bill agrees to bring paper ballots for people who sign up as members during LK, but people who have been previously sent an electronic ballot will not be permitted to vote on paper at the LK, due to the potential for double voting. The deadline is set as the evening of the Saturday of the LK, with an exact time to be announced at the Solena Malfermo. Phil requests that Bill inform the candidates as to their deadline for submitting their information. Bill will be submitting that request within the next week, including informing candidates of a deadline. It is suggested that the candidate biographies should be listed in Usona Esperantisto as well as with the ballots.

Financial Report

The reports have been sent out to board members. Nothing is out of the ordinary for the monthly items, and the year to date is doing better than expected at this time. Investments are up for the quarter, and things are looking good overall. Ruth, Bill, and David have been discussing with Chuck Mays that ESF has only been providing information on our donors quarterly, and we would prefer it monthly or, if possible, weekly, to allow us to thank large donors. David agrees to forward financial reports to the candidates.

President's Report

The president briefly summarizes the report he sent out to board members (Appendix A). Alex requests that we not delete old board meeting videos. Jane suggests that this is why we have the minutes and that leaving them as unlisted with no end date is a security risk. **Action Item: Jane will look into Slack discounts for non-profits to upgrade us to the professional version of Slack, in order to avoid having old messages automatically deleted.** Phil goes on to discuss the funds in summarizing his report. Ruth clarifies that the board agreed on a technology budget and that around July, we will get a Zoom account for E-USA, which can be used for regional coordinators, committee meetings, board meetings, and potentially also for local group meetings if requested.

Old Business

Flyers for an Upcoming Sci-Fi Convention

Will Morton made a flyer to pass out about Esperanto at a Sci-Fi Convention. This process has been going on for a while. 500 copies would cost about \$200, and the members

at the last LK explicitly added in a line item to the budget for \$500 to be spent on promoting Esperanto. Phil suggests that the board not micromanage our committees. The idea of a QR code is brought up, and Jane and Hoss suggest both a link and a QR code. Ruth points out that they now have a link for Esperanto-USA. David recommends that they send us the receipt for this and we reimburse them. Hoss expresses concerns due to a previous interaction with this committee and requests some specific changes, if we are to pay for this. Ruth requests specific feedback, and it is offered. Ruth asks Jane's opinion as a person who is familiar with sci-fi conditions. Jane responds that, if this flyer were to appear at a convention as-is, it would start fun conversations. Hoss offers to create a specific url for this flyer, which would allow us to track how many hits we get from this flyer in particular, in order to gauge effectiveness. The board agrees to discuss on Slack regarding procedures going forward regarding expectations of board interactions with committees.

New Business

Board Expenses for Congress

Ruth wishes to propose that just for this year we come up with a method by which board members may be reimbursed up to \$200 per board member to cover lodging, transportation, and Congress fees as necessary. If a board member does not need their \$200, that money can go to another board member who does need the \$200. If a person needs more than \$200, they are to inform Bill regarding this, and all approved expenses would be paid out by the board members and reimbursed by the organization. Alex recommends that we require any board members who accept such a stipend to do work at the LK. David moves that we accept Ruth's suggestion, and Jane seconds. The motion passes unanimously. A longer term solution will need to occur later, including potentially upfront money offered to people as needed. This will be discussed via Slack.

The meeting is declared closed.

Appendix A: President's Report

Videos of board meetings

The videos of our board meetings are to assist the secretary in creating minutes and for review by board members, such as those who have missed the meeting. They are for no other purposes. They are generally posted on youtube as unlisted, so that only those with a link can view the video. I suggest that after one month the videos be eligible for removal from Youtube.

Overview of how money in the General Fund and other funds work

The board creates a budget for the general fund, which is not valid until it is approved by a majority of the members at our annual congress (LK). That approval by members grants the board and the CO to spend up to that much

money for those accounts. Any money outside of that approval is the board's responsibility, which must be approved by the board majority.

Any money not spent in a category remains in the general fund for the next year. The board does not plan a budget for the other funds. They already have their money which is managed by the chair or committee of each fund according to the purpose of each fund.

Some reasons why special funds exist

In the recent decades when ELNA was losing money year after year, donors wished to support the projects which could no longer be supported by the budget. So special funds existed for their declared purposes, such as publications, publicity, education, etc. The result is that money continued to flow into those special funds, and those categories of expenditures disappeared from the budget altogether. The budget became the overhead while the funds were what reflected the purpose and vision of the members.

It is my wish that we create a budget that reflects our mission and vision and work to gather donations for the General Fund so that the true mission and vision that we hold in common can again be an integral part of our financial plan. We can do that with courage and without excuses.

I want us to discuss reasonable expenses for board members, so that we can attract board members of all levels of our culture and not just those who can easily afford the cost. It is perfectly legal to do this.

Board members who can afford some travel and registration expenses can repay those expenses by way of donating back to the board. The donations can also flow through the ESF donation system that we now have in place, and some of it up to a point will be eligible for matching funds.

Future Technologies

We cannot predict how technology will affect us, help us, or hinder us in the future, but some if it will have a financial cost. One example is Zoom or other online expenses. Who will pay for our Zoom meetings or Webinars? Are we going to hold AMA meetings? Ask Me Anything? Ask the President Anything? Ask the Board Anything? Tell the Board Anything? What will be the cost of our coming campaigns and communications with members? We must plan for growth in a way that helps our technology-savvy younger set without leaving other members behind.

We need to provide needed technologies to our local groups, such as Zoom meetings. We should not make excuses that we don't need to spend the money because they can use free services that are not as reliable. We can do better than that.

We must paint a picture that we are courageously embracing the future, being radically invitational to the younger set.

Regional Coordinators

We must at the same time raise the bar for communications with local groups and be patient with our regional coordinators. We do not give regional coordinators enough information to pass on to local groups.

We can survey members on various topics and ask regional coordinators to follow up, asking local groups to inspire their members to respond to the surveys.


Recommendations for the next board

1. Continue to improve communications and transparency with members.
2. Use surveys to ask specific questions of members.
3. Organized a themed membership drive starting in November of each year.
4. Organize a themed drive for financial donations starting in November of each year.
5. Leverage local groups and social media for campaigns.

The deadline for articles for UE is April 15.

Perdigota

senintenca esperantaĵo • Brandon SOWERS



Brandon sendis al ni la jenan foton el Portugalujo. Evidente temas pri vino tiel ebriiga, ke ĝi igos la aĉetinton perdi la botelon antaŭ ol malplenigi ĝin.

Alfabeta defio

loke • Arlyn KERR

Eble la legantoj de *Usona Esperantisto* interesiĝos pri la defio, kiun ni lastatempe prezentis en nia loka grupo en Seatlo. La celo estas verki frazon kun 28 vortoj, en kiu ĉiu vorto komenciĝas per malsimila litero. Ĝis nun, tri klubanoj respondis. Jen respondo de Andrew McCONNELL:



Ĥaoso englutis min samtempe Roberto iĝas nia bajadero, kaj ŝi ĵus demandis ĉiujn pri ŭatoj, antaŭ ol vi unufoje cinike frapis la zuman juglandon, tamen ĝi haste grandiĝis.

Kaj jen de Max MANOWSKI:

Ho, precize jes, la uniformportanta giganta ĥoro ĝoje zorgis kanti ĵazon, ne adaĝe, en ĉiuj ruĝaj

vagonoj de orkolora metroa trajno, sed ŝance, iliaj cent beboj ŭais forte.

Kaj fine, jen la mia:

Multaj homoj admonas ke zebroj ne rajtas ĵongli citronojn, sed unikaj junaj ĥameleonoj ofte ĝuas fari tion, la beboj eĉ ŝatas diri “ŭuf” ĉiufoje, verŝajne pro granda intelekto.



Arlyn KERR

Arlyn loĝas kun sia edzo Les en Bellevue, Vaŝingtonio.

<arlyn@morsekob.org>

Videoluda helpo serĉata

leterkesto • Mark HAMME

Elkorajn salutojn el la usona federacia malliberejo!

Io kurioza okazis: Mi aĉetis ludon en Esperanto por mia tabulkomputilo. Miaj amikoj rekomendis tion, sed mi neniam ludis D&D, nek Pathfinder. Eĉ Mario



Brothers estas ege malfacila ludo por mi. La ludo nomiĝas *Shattered Pixel Dungeon*. Malavara dana E-isto helpis min aĉeti la tabuleton. Sed mi ne povas uzi retroŝton, ĉar la federacia punsistemo ne permesas aliron al Interreto.

La priskribo de la ludo tekstas: “La plej supraj keletaĝoj de la labirinto formas kloakaron de la urbo. Kiam malbona povo komencis aperi de malsupre, ordinaraĵ sendanĝeraĵ kreaĵoj de la kloakaro iĝis pli kaj pli danĝeraĵ. La urbo sendas patrolojn suben por certigi sekurecon de homoj malsupre, tamen ili iom post iom fiaskas.” Evan DEBENHAM kreis la ludon, kaj

ĝi havas **retejon** <<http://shatteredpixel.com>> (kiun mi ne povas kontroli).

Neniam ludinte rolludon, mi estas ege perdita. Sed por plibonigi la lingvokapablon, mi lernas. Mi ankoraŭ instruas bazajn ĝis progresintajn lernantojn de la hispana, do la ludo helpas kun tio. Eble mi neniam komprenos, kio signifas *levelling up* ĉar mi ankoraŭ devas lerni kiel mortigi ratojn!

Ĉu iu povus sendi al mi informlibreton pri la ludo, por ke mi komprenu ĝin? Povus esti en la angla, la hispana, aŭ Esperanto. Ĉi tie estas preskaŭ neeble akiri informon.

Se iu volas korespondi pri *Shattered Pixel Dungeon*, la hispana, katoj, aŭ alia temo, korespondado ĉiam bonvenas.

La poŝtadreso por Mark estas: Mark Hamme
#33391-379 / USP / P.O. Box 24550 / Tucson AZ 85734 / USA

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, only expenditures of \$10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <<https://bit.ly/3LzL1LK>> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2023-02-02	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2023-02-13	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2023-02-13	Federal & State Payroll Taxes	695	Salaries	Employee taxes
2023-02-13	HARRISWB	1736	Salaries	payroll
2023-02-14	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2023-02-16	UPS	558	Office Expenses	Postal box rental - 1 year
2023-02-17	ADP	59	Payroll Fees	fees
2023-02-21	UEA-V	5000	UEA konto	al ELNA-konto elna-w - 4645.99 EUR
2023-02-21	WILLIAM PEACE UNIVERSITY	2500	E-USA Convention Expenses	Deposit invoice #94359
2023-02-23	ESF-V	220	ESF Reg. Payable	Costs of the LK in 2019
2023-02-23	Mays, Charles	3200	Schulze Ed. Fund Expenses	subtenado de homoj ce NASK
2023-02-28	PAYPAL	64	Credit Card Expenses	Fees
2023-02-20	UEA-V	125	Goldman Fund Expenses	EKZAM + KER_ekzamenoj - 12 atestiloj
2023-03-03	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2023-03-08	ENDICIA	48	Member Mailing Expenses	postage for KER atestiloj
2023-03-08	ENDICIA	292	Catalog Service Postage	postage
2023-03-10	STAPLES	46	Cost of Catalog Sales	10 ekz. de DekDemandoj
2023-03-13	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2023-03-13	Federal & State Payroll Taxes	695	Salaries	Employee taxes
2023-03-13	HARRISWB	1736	Salaries	payroll
2023-03-14	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2023-03-15	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost
2023-03-15	BOA CC 7572	35	Licenses/Permits/Taxes	sales tax
2023-03-15	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2023-03-15	BOA CC 7572	45	Telephone/Fax	800 number
2023-03-15	BOA CC 7572	67	Res Publishing Fund Expenses	books sent to Tony by Hoss
2023-03-17	ADP	59	Payroll Fees	fees
2023-03-08	EBAY	300	Small Equipment Purchases	replacement DYMO printer
2023-03-31	PAYPAL	126	Credit Card Expenses	Fees
2023-03-24	UEA-V	566	Membership Maint. Expense	[1313] Aligitaj Membroj

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



A brief language lesson about *ambaŭ*

language corner • Lee MILLER

The word *ambaŭ* functions as a pronoun and an adjective. It means “both” in the sense of “two things together,” “two things considered as a whole or unit.”

For example:

Ambaŭ knaboj ludas en la korto. =
Both boys are playing in the yard.

Kie estas viaj du filoj? **Ambaŭ** ludas ekstere. =
Where are your two sons? **Both** are playing outside.

In English there’s an expression:

both ____ and ____

It doesn’t have the sense that the two things or people are necessarily together or a whole, but that they are similar in some way. For example,

Both Molly **and** I live in Texas.

I like **both** dogs **and** cats.

In Esperanto, the “both ____ and ____” structure is “kaj ____ kaj ____”:

Kaj Molly **kaj** mi loĝas en Teksaso.

Mi ŝatas **kaj** hundojn **kaj** katojn.

In the last sentence, if I wrote “Mi ŝatas ambaŭ hundojn kaj katojn,” the meaning would be “I like both (of the two) dogs, and cats.”

“Kaj ____ kaj ____” may take a little getting used to for English speakers, since we use different words for the first and second term. But this pattern is common in Esperanto, for example:

nek ____ nek ____ = neither ____ nor ____

aŭ ____ aŭ ____ = either ____ or ____.



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the *Akademio de Esperanto*, an expert Esperanto instructor, and he has administered the *Duolingo Esperanto Learners* Facebook group since its inception in 2015.

<licxjo@gmail.com>

Kolofono

Redaktoro/Editor: Hoss FIROOZNI

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retroŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitaĵajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed eo>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.

Debutas defio domena

traduku! • HOSS FIROOZNIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj kaj komentoj.

Dum ni ankoraŭ ŝvitigas vin per la pasintnumera tradukdefio el la angla en Esperanton (ni traktos la rezultojn venontnumere), jen la altern-numera defio por via konsidero, el Esperanto en la anglan.

La teksto venas el la ĉi-jare aperinta novelaro ***Dek du rakontoj***

<<https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>> de

brazila aŭtoro Paulo Sérgio VIANA. La eldonejo Sezonoj kompleze eldonis ĝin senpage, do oni povas libere elŝuti la bitlibron.

Per la jena fragmento komenciĝas novelo titolita *La domenisto*. Kiel vi enangligus ĝin?

Mi bone memoras, kiam mi envenis tiun kafejon la unuan fojon, antaŭ kelkaj monatoj. Mi ĉirkaŭrigardis la ejon por serĉi tablon kaj mendi mian matenmanĝon, kaj mi vidis Fernandon sidanta ĉe fenestro, en la fundo de la ĉambro. Lia kalva, ronda kapo brilis sub la lumo de la mateno, kaj lia longa, pendanta nazo ŝajnis al mi iom komika. Li aspektis kiel iu, kiu atendas aliulon. Li havis antaŭ si etan tason da kafo kaj bluan platan skatoleton. Li kun mieno de kontenteco rigardis al



La bitlibro *Dek du rakontoj* estas **libere elŝutebla**

<<https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>>

mi, kaj kvankam troviĝis pluraj tabloj liberaj, li laŭte invitis min:

– Amiko, bonvolu sidiĝi ĉe mi!

Dum momento, mi timis, ke mi ne memoras pri de longa tempo ne vidata konato, kaj mi rapide serĉis en mia memoro. Ne, mi ne konas tiun long-nazan, pendorelan maljunulon, sed lia invito iel sonis al mi nerezistebla, kaj se eventuale li proponos interesan babiladon, eble estus oportune ne engluti mian mantenmanĝon maĉante miajn zorgoplenajn pensojn, tute sola. Mi decidis riski. Mi mendis mian manĝon de servisto kaj sidiĝis ĉe la nekonato.

– Bonan matenon. Bela vetero, ĉu?

– Bonan. Mia nomo estas Fernando. Mi ne volas perdigi al vi tempon. Mi ne ĝenos vin per teda interparolo kun stulta maljunululo. Mi estas okdek-unujara, kaj almenaŭ tion mi ankoraŭ ne forgesis, ke maljunuloj estas preskaŭ ĉiam enuigaj homoj. Mi vokis vin por eta peto. Ĉu vi bonvolus ludi ununuran partion de domeno kun mi? Tio kostos al vi nur kelkajn minutojn, dum kiuj vi povos senĝene manĝi vian matenmanĝon.

– Interesa propono. Ĉu vi kutimas inviti nekonatajn homojn por tio?


– Jes, sed malmultaj akceptas la inviton. Ĉiuj hastas. Mi dankas, ke vi konsentas.

– Jes, ni ludu unu partion.

La redakcio (trovu ĝian adreson en la kolofono) akceptos vian proponon **ĝis la 15-a de Junio**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ ne volas. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu proponon**, ne plurajn diversajn provojn. Sukceson!

La ekesto de artefaritaj verkistoj

scienco • Timothy BORONCZYK



En la lasta numero mi verkis pri la populariĝo kaj problemoj de artefaritaj intelektoj (AI), kiuj kreas bildojn el tekstaj priskriboj. Ekzistas ankaŭ aliaj AI-sistemoj kiel ekzemple ChatGPT, kiuj respondas al demandoj kaj kreas tekstojn. Kaj simile, laŭdoj kaj plendoj pri ili abundas. En tiu ĉi artikolo mi prezentos informon pri ChatGPT, pri ĝiaj limoj, kaj kiel vi povas uzi ĝin Esperante.

Kio estas ChatGPT?

Genera antaŭtrejnita transformilo (GPT, angle: *Generative Pretrained Transformer*) estas speco de AI por fari tekstojn. OpenAI kreis la unuan version en 2018, konsistantan el 0,12 miliardo da parametroj kaj trejnitan per 4,5 GB da teksto por laŭkuntekste prognozi la sekvan vorton en frazo.

Ekzemple, se oni dirus al vi, “Pasporto al la tuta _____”, verŝajne vi respondus, “mondo”. Sed, ĉu oni ne uzas pasporton por viziti specifajn landojn? Danke al la tiel nomata Esperanto-kurso, la vortoj “Pasporto al la tuta mondo” aperas pli ofte en Esperantaj tekstoj ol “Pasporto al la tuta EU”. Tial, statistike, la pli bona respondo estas “mondo”.

Tiaj taskoj estas multfoje prezentitaj al la AI, kaj ĝi agordas siajn internajn parametrojn por respondi ĝuste. Ke GPT produktas koherajn frazojn estas efektive miraklo de matematiko kaj statistiko.

La duan version, GPT-2, OpenAI publikigis en Februaro, 2019. Ĝi estis dekoble pli granda,

konsistanta el 1,5 miliardoj da parametroj rezulte de trejnado per 40 GB da teksto. En Novembro, 2019, la firmao anoncis version GPT-3, konsistantan el 175 miliardoj da parametroj kaj trejnitan per 570 GB da teksto. Kaj en Marto, 2023, anonciĝis GPT-4 – sed detaloj pri la trejnado ne estas publike haveblaj.

ChatGPT utiligas kaj GPT-3 kaj GPT-4, kaj ĝi estas plitrejnita por konversacia interago. Malgraŭ la furoro pri ChatGPT, la vera potenco de GPT estas, ke oni povas facile adapti ĝin al specialaj taskoj, ĉar ĝi jam lernis la bazan lingvostrukturon.

Maltrankviliĝoj

Profesoroj timas, ke studentoj uzos ChatGPT-on por verki siajn eseojn. Maltrankviliĝas pri tio mia amiko, verkisto de fikciaĵoj; li suferas de preskaŭ ekzistisma krizo. Kaj artikoloj jam proklamas, ke ChatGPT estas kaŭzo de perdita honesteco, etiko, kaj scipovo.

Tamen konsideru la jenan: studentoj jam trompas de jarcentoj; ĵurnalistoj uzas aŭtomatajn korektilojn, literumilojn, kaj gramatikajn kontrolilojn; politikistoj gajnas grandajn sumojn per aŭtobiografioj verkitaĵoj por ili de dungitoj; kaj en iuj kulturoj, plagiato estas aprobita.

Eĉ Sokrato argumentis, ke oni prefere komunikiĝu parole. Li timis, ke dependiĝo je skribado difektos la memoron; ke legante (sed ne aŭskultante), homoj interpretos tekstojn nur laŭ la intencoj de la aŭtoroj; kaj ke per skribado homoj disvastigos malveraĵojn.

La mondo fariĝas pli kaj pli malsimpla. Malgraŭ la timoj de Sokrato, oni nun devas scipovi legi kaj skribi. Rapide venas mondo, en kiu generaj AI-sistemoj estos ĉie. Anstataŭ ol taksu tiun mondon malamika, verkistoj kaj instruistoj lernu pri ĝiaj kapabloj, starigu normojn, kaj instruu studentojn pri kiel respondece uzi generajn ilojn. La veraj problemoj rilatas al la limoj de GPT kaj ekonomiaj faktoroj.

Vere aŭ fantazie?

Ĉar GPT estas nur statistika ilo; ĝi ne komprenas verecon aŭ malverecon. Memoru, ke ĝi lernis

prognozi sekvantajn vortojn surbaze de ekzemploj ricevitaj dum trejnado. Se la vortoj “Biden”, “Prezidento”, kaj “Usono” ofte aperas sufiĉe proksime al unu la aliaj, eble GPT diros, ke Joe Biden estas Prezidento de Usono, sed ĝi ne kapablos fidinde dedukti, juĝi pruvon, aŭ konfirmi informojn per aliaj fontoj. Tiu limo prezentos gravan riskon se oni pli ofte utiligos ĝin en diversaj fakoj.

Pro striktaj limdatoj en ĵurnalismo, raportistoj sentas tenton nur supraĵe kontroli faktojn, kaj uzo de GPT altigas riskon de senintenca disvastigo de malveraĵoj. Tio sekve povus subfosi fidon pri ĵurnalistoj kaj eĉ kredindigi konspiriteoriistojn.

En Februaro, la novaĵagentejo Associated Press (AP) anoncis kelkajn esplorojn por plirapidigi siajn laborojn per GPT. AP jam uzas AI-ojn ekde 2014 por verki artikolojn pri financo kaj sporto, kaj provas alpreni novan teknologion respondece kaj malrapide. Kontrastu ĝin kun CNET, kiu spertis fortan kontraŭreagon kiam ĝi publikigis pli ol 70 artikolojn de ChatGPT dum tri monatoj, plenajn je eraroj.

Inĝenieroj nun esploras metodojn por plibonigi GPT-on. Plejofte oni aŭdas la proponon, “trejnu ĝin per pli granda datumaro!” Kaj jes, ĝenerale ju pli da datumoj, des pli bonaj estas la rezultoj. Sed trejnado postulas tempon kaj monon kaj nur donos al la sistemo novajn informojn. Ĝi ankoraŭ ne povos juĝi verecon.

Ekonomiaj faktoroj

Alia problemo de GPT estas ĝia bezono de multaj rimedoj. Pli malgrandaj (kaj malpli kapablaj) versioj bezonas sufiĉe modernajn komputilojn, sed GPT-3 kaj GPT-4 bezonas grafikajn procesorojn (GPU) en kvanto kutima por granda komerca datumejo.

Oni kalkulas, ke por funkciigi ChatGPT-on, OpenAI elspezas proksimume tri milionojn da dolaroj monate, uzante 20 000 GPU-oj (Nvidia A100). La firmao pligrandigas ĝin por komercaj celoj, kaj tio postulas multe da mono kaj pli da procesoroj. Kiam aliaj organizoj konstruos siajn proprajn AI-sistemojn, rimedoj fariĝos pli malfacile troveblaj kaj la prezoj de tiuj rimedoj plialtiĝos.

Tamen mi ne certas, ĉu funkciigi tiajn sistemojn *devas* kosti tiom multe. Varianto de GPT nomita

LLaMA, konsistanta el 65 miliardoj da nodoj, estis trejnita de Meta/Facebook. Universitato Stanford plitrejnis ĝin por konversacio, kaj la rezulto estas simile al ChatGPT kun GPT-3. En Marto, LLaMA estis senpermeso publikigita. Tiam, lertaj AI-esploristoj adaptis ĝin, por ke ĝi funkciu ĉe kutima aparataro. Kompreneble, por komercaj AI-sistemoj oni kutime bezonas datumejon, sed eblas redukti la bezonatajn rimedojn. Ĝis nun ne estas indiko, ke OpenAI esploras similan reduktan aliron – ĝi daŭre trejnas sistemojn pli kaj pli grandajn.

Firmaoj konkurencas, konstruante pli kapablajn AI-sistemojn, kaj pro financaj instigoj ili emas regi aliron al tiuj sistemoj. Estas malpli da instigo por esplori, kiel fari AI-sistemojn pli efikajn kaj haveblajn por ĉiuj. Mi timas, ke nur grandaj firmaoj profitos de la avantaĝoj de AI, kreante pli da malegaleco.

ChatGPT kaj Esperanto

Homoj uzas ChatGPT-on por multaj celoj, ekzemple: recenzi blog-afiŝojn aŭ novaĵ-raportojn; elpensi ideojn por antaŭenigi karieron; kaj diskuti kun la AI pri filozofiaj temoj. Mia laborfako estas programado, do mi foje uzas ChatGPT-on por helpo en programado, sed ankaŭ kiel verkistan kaj tradukan helpanton.

Miasperte, ChatGPT ne taŭgas por aŭtomate verki longforman fikcion. Ĝi ne kapablas verki longan tekston kohere, eĉ se oni dividas la taskon en malgrandajn pecojn. Ĝi iom pli sukcesas pri mallongaj rakontoj, sed la rezultoj estas ripetiĝemaj kaj la intrigo tro divenebla. Se vi gvidas lokan Esperantan grupon, eble vi volus peti mallongan rakonton de ChatGPT por komuna tradukekzerco.

Aliflanke, eble vi prezentu vian verkon al ChatGPT kaj petu sugestojn por plibonigi ĝin. La AI ankaŭ tre bone funkcias por cerbumi pri ideoj kaj plani rakontojn. Ekzemple: petu al ĝi prezenti kvin ideojn por rakonto, en kiuj la ĉefrolulo ŝajnis sian morton por eviti imposton.

Por tradukado, estu same skeptika pri ChatGPT kiel pri Google Translate. Ĝia kapablo verki bonstilan kaj naturan esperantaĵon, kaj klarigi gramatikajn temojn, estas ege malbona. Ekzemple:

Mi: Translate to Esperanto: “As they were

driving back from a weekend getaway, John felt a strange pain in his chest."

ChatGPT: Dum ili revenis hejmen el weekenda eskapado, John sentis strangan doloron en sia brusto.

Mi: Is "weekenda" really an Esperanto word?

ChatGPT: "Weekenda" is not a common Esperanto word, as it is a loanword from English. The more common Esperanto word for "weekend" is "fino de semajno" or "semajnfino". However, since Esperanto is an international language and has a flexible structure, it is acceptable to use loanwords in certain contexts where the meaning may not be immediately clear or where the use of the Esperanto equivalent may be impractical.


Sed la teknologio nepre pliboniĝos, ĉu ne? Nu ... ĉu vi memoras la ekscitiĝon en Esperantujo, kiam Google unue aldonis Esperanton al sia tradukilo? Jardekon poste, Google Translate estas iom pli bona, sed ankoraŭ ne fidinda por gravaj celoj. Kaj la teknologio pri artefaritaj intelektoj estas pli progresinta ĉe Google ol ĉe multaj aliaj firmaoj. OpenAI deziras la plej grandan profiton el siaj investoj, kaj tio influas ĝiajn decidojn pri kiel trejni GPT-on. Sen financa instigo, estas tre malprobable, ke la Esperanta kapablo de ChatGPT multe pliboniĝos.

Sed ChatGPT bone kapablas prezenti plurajn

alternativojn por frazo. Tiu kapablo estas tre utila, kiam oni trafas komplikajn frazon, kion oni ne scias kiel (aŭ ne volas) precize traduki. Petu de la programo kelkajn similajn frazojn: eĉ se la respondoj ne estas perfektaj, ili eble inspiras al vi pli bonan ideon.

Konkludo

ChatGPT, kaj aliaj aplikoj de GPT-sistemoj, prezentas multajn novajn eblojn por homoj en diversaj fakoj. Sed novaj ebloj ofte kunportas novajn problemojn. Pri honesteco kaj etiko, rilate al GPT, mi ne timas; problemoj pri tiuj ekzistis jam de la pratempoj. Miaopinie, pli severa ol trompa misuzo estas malprudenta utiligo fare de avaraj firmaoj. Grandaj organizoj havas multe da influo, kaj ekonomia plimalegaligo pro la teknologio malplibonigos la situacion. Tamen, la ĝino de artefarita intelekto estas jam liberigita de la botelo. Do estas grave, ke ni strebu uzi AI-sistemojn en manieroj, kiuj plibonigos la vivon.



Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas unu el la direktoroj de Esperanto-USA, estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel

programisto.

<tboronczyk@gmail.com>

Mikronoveloj

Por nia mikronovelo-rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Mi ne rezignos

Unue venis la vento. Mia hejmo estis detruita. Sed mi ne rezignos.



Sekve venis la inundo. Ĉiuj miaj valorajoj estis forportitaj. Sed mi ne rezignos.

Finfine venis la pesto. Tiom da malsano kaj tiom da kadavroj. Mi ne scias, kial ĉio devas esti tiel malfacila, sed mi ne rezignos.



Pardonon, sinjoro. Mi ne finis tondi vian gazonon. Forblovante la foliojn, mi malkovris formikejon kaj provis forblovi ankaŭ ĝin.

Sekve mi ŝprucigis akvon sur ĝin.


Finfine mi provis iom da veneno.

Bedaŭrinde nenio efikas, ĉar ili daŭre rekonstruas. Mi ne scias, kial ĉio devas esti tiel malfacila, sed mi ne rezignos.

— Joshua HOLZER <josh.holzer@westminster-mo.edu>

Miskompreno

Sato kaj ripozo estis nerezisteblaj tentoj post la katastrofo. La postvivantoj tiom al kutimiĝis al raboserĉado, ke neniuj emis pridubi sian bonŝancon. Tanda fariĝis por ili savanto, promesante manĝaĵon, ŝirmejon, eĉ medikamentojn.



Ĉiutage, Tanda skoltis kaj provis rekrutigi iun ajn, kiun ŝi trovis, por rifuĝi ĉe ŝi. Hodiaŭ, tri homojn ...

morgaŭ, kvin homojn ... al ĉiuj ŝi prezentis komforton en mondo sen luksaĵoj.

“Pardonon, mi ne volas impertinenti,” diris unu rifuĝinto. “Ni estas tre dankemaj! Sed vi savis tiom multe da homoj, tamen via domo neniam ŝajnas plenplena.”

Tanda ridetis ironie. “Savis? Vi miskomprenis, kara. Mi ne estas anĝelo ... mi estas predanto.”

— Timothy BORONCZYK <tboronczyk@gmail.com>

Ĉu ChatGPT savos la laboriston?

“Ĉu vi finis redakti?” li demandas, enpaŝante en la ĉambron.



Ŝi kapjesas. Li prenas la paĝojn de sur la tablo. Ŝi skribis notojn enmarĝene per la golfkrajono, kiun li provizis.

“Dankon.”

Ŝi ne respondas.

Li suspiras. “Ankaŭ mi ne ŝatas la situacion.”

Nenio.

“Fakte, mi serĉas solvon. Sed dungi redaktoron estas multekoste. Kaj komputilo-programoj ne funkcias sufiĉe bone. Ĉu vi aŭdis pri ChatGPT?” Tiam li memoras: neniuj televidiloj, neniuj Interreto. “Mi supozas ke ne. Ĉiokaze, espereble mi baldaŭ povos uzi ĝin anstataŭe.”

Subite vigla, ŝi rekte eksidas. Ŝiaj katenoj klakas. “Tiam vi liberigos min?”

Li ridetas malgaje. “Iusence,” li diras.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>

Poŝtoŝtelisto

La urbostratoj estis labirinto de bruo, homoj, kaj

fortuno.


Meze de homamaso, la mano de ŝtelisto senpene glitis en poŝon de nekonato, kie liaj fingroj renkontis falditan slipon. Scivole, li zorge elprenis la paperfolieton kaj malfaldis ĝin:

“Mi sciis, ke vi provos.”

La ŝtelisto ŝokiĝis. Dum jaroj li perfektigis sian metion por fariĝi unu el la plej lertaj ŝtelistoj en la urbo, kaj jen la unua fojo, ke oni antaŭvidis lin ... ne, devas esti trompo!


La poŝoŝtelisto ĉirkaŭrigardis; lia mieno montris ne nur ĉagrenon, sed amuzon. La nekonato prezentis al li defion. Kaj iun tagon, ili denove renkontiĝos por revanĉo.

— Timothy BORONCZYK <tboronczyk@gmail.com>



Prometeo inkognita

Prometeo atendas envice por mendi tagmanĝon dum ĉeestantoj singarde gvatas lin. Li estas strangulo: Lia larĝa kravato estus pli taŭga por la 1970-aj jaroj, kaj ĝi neniel kongruas kun liaj t-ĉemizo kaj Croc-oj. Estas malfacile resti laŭmoda kiam la jardekoj pasas tiel rapide. Cetere, jarmiloj da turmento iom frenezigis lin.



La flamoj flagrantaj ĉe la rostokrado kaptas lian atenton. Li ridetas malgaje. Turniĝante al virino staranta proksime, li kapsignas al la fajro. “Mi faris tion,” li diras. Ŝi iomete retropaŝas.

Li suspiras. Neniu memoras, kaj neniu iam scios, kiom multe li oferis, por ke homoj povu ĝui siajn rostitajn hamburgerojn.

— Debra HAMEL <hamel.debra@gmail.com>